131-132 mankas 30.gr

3-a Jaro. N-o 139 APERAS SEMAJNE 28. Majo 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA ESTONTECO DE ĈINIO

Ĉinio havas tri-kvarcent milionojn da loĝantoj; escepte kelkaj milionoj da mahometanoj kaj kelkcentmiloj da "sovaĝuloj", rifuĝintaj sur la supro de l' montoj, tiu grandega homamaso estas rimarkinde homogena. La ĉinoj ja havas saman (skriban Trad.) lingvon, kvankam ĝi estas malsame parolata en diversaj regionoj; ili praktikas, estas vere, tri malsamajn religiojn, tiun de Konfucio, tiun de Lao-Ce, tiun de Budha; sed, fakte, ĉiuj ĉinoj havas la saman kulton al la prauloj. Forestas kastoj kaj nobelaro. (La manĉuriaj nobeloj de la tempo de la Imperio restis ĉiam en la kortego kaj ne konsistigis veran nobelaron). Ekzistas nur ŝtatoficistoj, konkurse varbitaj. La ĉina kampulo estas la egalulo de ĉiuj, kaj tiu egaleco estis simbole montrata per la fakto, ke unu fojon ĉiujare la imperiestro ŝajnplenumis la laboron de kampulo.

Popolo el ĝardenistoj

La unueco de tiu grandega popolamaso devenas de la uniformeco de ĝia produktmaniero, de la unueco en la kampkulturo. La ĉinoj estas ĉiuj kulturistoj kaj praktikas la intensan kulturon: ili estas ĉiuj ĝardenistoj.

Antaŭ miljaroj, ili venis el la stepoj de Centra Azio, penetrante en la mondparton, kiun oni nomas Ĉinio, tra la nunan provincon Kansu.

Tie ili trovis la flavan grundon. Mirakla estas tiu tero. Ĝi havas nelimigitan profundecon, perfektan malpenetreblecon kaj neelĉerpeblan produktopovon. Ĝi ne bezonas ian ajn sterkon, nek necesigas potencajn rimedojn por fariĝi plugebla aŭ malkompakta; tiu grundo estas tuj preta por ricevi la semojn kaj multobligi ilin laŭ proporcio kiu neniam malpligrandiĝas. Ĝi estas donaco de la dezerto. La grandaj ventoj de Centra Azio skrapis dum jarcentoj la grundon de la dezerto Gobi; ili forblovis erojn el ĉiuj specoj de grundo, kirlomiksis kaj muelis ilin por fari tiun senmankan kaj malkompaktan miksaĵon, kiu fiksiĝis tuj kiam ĝi renkontis klimaton sufiĉe malsekan. Kelkloke la fruktodoneco de tiu grundo estas tia, ke 40 personoj povas vivi per unu hektaro.

Tiu tero faris la ĉinon. Sur tiu fruktodona grundo, veninta kiel li tra la dezerton, la ĉino fiksiĝis, kulturante kaj naske multobliĝante, lerte penadante viviĝi kiel eble plej da idoj per kiel eble malplej granda surfaco de la multvalora tero.

Poste, kiam, malgraŭ ĉio, la regiono de la flava tero fariĝis tro malgranda por nutri tiun senĉese pligrandiĝantan popolon, la ĉino iris al la Sudo. Tie ne plu estis flava tero, sed tamen ekzistis kondiĉoj, kiuj ebligis al li praktikadi intensan kulturon. Li trovis la grandegan basenon de la riverego Jang-Ceŭ, kun ĝiaj enfluantoj (alfluaj riveroj), kiuj liveras la akvon necesan por intensa kulturo. Proporcie kiel li venis sub pli varmajn klimatojn, li anstataŭis la tritikon per rizo.

Tiel, iom post iom, similiĝante al si aŭ forpuŝante la praloĝantajn popolojn, la ĉina kampulo invadis sinsekve la basenon Jang-Ceŭ, poste tiun de Si-Kiang.

Tiu antaŭenpuŝo al la Sudo daŭras ankoraŭ nuntempe. En ĝia plej antaŭnelonga fazo ties etapojn oni povas dati kun precizeco. Estas nekonata dato, kiam la anamanoj, la nuna avangardo de la ĉinoj en ilia antaŭeniro al la Sudo, forlasis Ĉinion por sin instali en la delton de Tonkino; sed oni scias, ke estis la dekkvara jarcento, kiam, antaŭenirante laŭlonge de la marbordo, ili detruis la malajan imperion, kiu okupis la teritorion de la nuna Anamo, kaj tute anstataŭis la primitivan popolon. Tri jarcentojn pli poste, je la fino de l' deksepa jarcento, ili venis loĝatigi la delton Mekongo, la nunan Koŝinĉinion, forpuŝante la kamboĝanojn. Nuntempe ili laŭgrade anstataŭas la indiĝenojn en Kamboĝo kaj Siamo. Estas de ĉiuj konfesita fakto, ke en iu ajn regiono, loĝata de pli primitiva popolo, kiam tien venas anamanoj, en tre mallonga tempo la indiĝena popolo tute malaperas. Tiel ĉe nia vido okazas en Indoĉinio tio, kio okazis en la mondparto, kiun ni nomas nuntempe Ĉinio. Kiam la intensa kulturisto, la akvumisto ekposedas la grundon al kiu li produktigas 100, tie, kie la primitiva posedanto rikoltis nur 10, ĉi lasta, devige, malaperas.

Tia estis la hieraŭa aspekto; ni rigardu nun la morgaŭan.

Estonta popolo el ministoj

Ĉinio posedas la flavan grundon, sed ankaŭ ŝtonkarbon. Ĝia subgrundo estas laŭlitere plenigita je karbo. Same kiel la flava tero kaj la akvumeblaj ebenaĵoj de Ĉinio ebligas, ke ĝi nutru la plej densan agrikulturan popolon, ekzistantan en la mondo, same per la posedo de karbo ĝi povas liveri laboron al la plej densa industria loĝantaro. Tiu kampula svarmejo povas duobliĝi per svarmado de ministoj, metallaboristoj, mekanikistoj.

Ne nur abundas ŝtonkarbo, sed ĝi troviĝas ĉe la supro de l' tero. La plej granda mintavolo el Ĉinio, kaj sendube el la tutmondo, troviĝas meze de la flavtera regiono, en Ŝansi kaj Ŝensi. La tut-

monda karboelfosado estante 1200 milionoj jare, tiu baseno sola povus sufiĉi por la bezonoj tutmondaj dum dek jarcentoj.

Pli sude, en Hunan kaj Kiang-Si, estas alia baseno, malpli grava, sed tamen komparebla, laŭ graveco, kun tiu el Pensilvanio, en Usono.

Fine, ĉe la sudorienta ekstremo, en Junam, same kiel en la provincoj Seŭ-Ĉuan kaj Kuei-Ĉeu, la karbo troviĝas preskaŭ ĉie. En Junam oni taksas ĝian kvanton je 30 miliardoj da tunoj.

Notinde estas, ke tiuj taksadoj koncernas nur la karbon videblan ĉe la supro de l' tero. Kiam oni esploros la profundaĵojn, kredeble la nunaj taksadoj povos esti tre multe pligrandigataj.

Kvankam la karbo konsistigas la esencan elementon, ĝi sola tamen ne sufiĉas por ke iu lando povu fariĝi industria; necesas plie ferminaĵo. La realaj ferriĉaĵoj de Ĉinio estas malfacile takseblaj. Tamen oni scias, ke ekzistas ferminaĵo en multaj lokoj. Unue en Ŝansi, kie ankaŭ troviĝas karbo kaj en la sama mintavolo. Ekzistas ja en Ŝansi la samo kiel en Soktlando kaj Kimrio, kie la tavoloj de ferminaĵo tuŝas la karbotavolojn.

La Ŝansi-a regiono, kie troviĝas la flava tero, karbo kaj ferminaĵo, ŝajne devus fariĝi la granda metalurgia centro de Ĉinio. Bedaŭrinde la Flava Riverego estas malprofunda en multaj lokoj kaj pro tio ne taŭga por la ŝipveturado. Sed ekzistas ankaŭ ferminaĵo en la baseno de la riverego Jang-Ceŭ, ne tre malproksime de la karba baseno de Hunan. Pro la transportfacileco, kiun donas la grandegaj akvovojoj de la riverego Jang-Ceŭ kaj ĝiaj enfluantoj, kies longeco, laŭ Reclus (Reklü), egalas la duonon de la tergloba cirklo, probable stariĝos tie la granda metalurgia centro de Ĉinio.

Ni aldonu, ke la ĉino estas treege kapabla por la metalurgia laboro, kiel tion mire konstatis anglaj inĝenieroj, kiam ili ekfunkciigis en Hanjang la unuan kaj ĝisnune solan metalurgian fabrikon en Ĉinio.

Ĉu libera aŭ kontrolita industriiĝo?

Ĉinio tutcerte posedas karbon, ferminaĵon kaj laborforton. Per tio ĝi do povas starigi la plej potencan industrion el la mondo, industrion kompare kun kiu la usona aspektas kiel pigmeo.

La industriiĝo de Ĉinio estas tute ĉe la komenco. Ĝi konsistas nur el kelkaj ŝpinfabrikoj en Ŝanghai, el metalurgia fabriko en Hanjang kaj proksimume 12 000 kilometroj da fervojoj. La industriiĝo de Ĉinio havas grandegajn eblecojn. Ili estas el klaso kun kiu ekzistas nenio komparebla en Eŭropo kaj Ameriko.

Jam nun la demando estas jena: kiel okazos tiu industriiĝo? Kun la helpo de kiu kaj sub kies kontrolo? Ĉu kun la helpo de Eŭropo, aŭ de Usono, aŭ de Japanio kaj sub ilia kontrolo? Aŭ ĉu la ĉinoj mem kaj sen ies kontrolo industriigos sian landon?

Unuaokaze, eŭropanoj, usonanoj, japanoj provos imiti kion faris angloj en Hindio: ili celos limigi tiun industriiĝon por ke ĝi nur povu malaltpreze liveri al ili krudaĵojn, por ke ĝi ebligu pliampleksigi ilian merkaton de fabrikitaj objektoj kaj alproprigi al si la plivaloriĝon, kreitan de la novaj proletoj; duaokaze ili devos lasi Ĉinion industriiĝi laŭ ĝia bontrovo kaj laŭ direktoj, kiuj akordiĝos aŭ ne kun iliaj.

Sur la teritorio de la plej multnombra agrikultura loĝantaro el la mondo, ĉu povos libere stariĝi la plej potenca industria loĝantaro? Ĉu Eŭropo, kiu vivas nur per sia preskaŭa monopolo industria, perdos sian vivrimedon?

Ĉu estas la falo de Eŭropo kaj la leviĝo de Oriento? Jen la demando al kiu respondos la rezulto de la granda batalo, kiu okazas nun inter la Potencoj kaj Kuo-Min-Tan.

Laŭ ni, la rezulto ne estas duba. Oni ne limigas la progreson. Tuj kiam ĉi lasta ien penetras, ĝi sukcesas, malgraŭ ĉio, malvolvi ĉiujn siajn konsekvencojn. Same kiel, en la jaro 1853, la amerika komandanto Perry perforte devigis la malnovan, agrikulturan kaj feŭdan Japanion malfermi ĝiajn havenojn al la amerika komerco, Ameriko kreis al si konkuranton en la Pacifika Oceano; same kiel, en la sama jaro, la unua vagonaro ruliĝis en Hindio, per tio Britio kreis al si konkuranton, kiu detruas ĝian fundamentan industrion; same kiel, dek jarojn antaŭe, tiu sama Britio per kanonpafoj devigis Ĉinion akcepti la opion de Hindio, ĝi kreis la metalurgian potencon, kiu venkos ĝin — kaj Eŭropon. Ekzistas, se ne justeco nepra, almenaŭ nepra logiko.

Venkos Oriento, kaj, profitante la sperton de la subpremataj klasoj eŭropaj, konforme je la profetaĵo de Sun-Jat-Sen, ĝi donos novan civilizacion al la mondo.

Laŭ artikolo de *R. Louzon (Luzon)* en "La Révolution Prolétarienne" (La Proletara Revolucio) kompilelfrancigis E. L.

ATENTIGO


Multaj K-doj sendube ne scias, ke la redaktejo de "S-ulo" sidas en Paris. Ili sendas manuskriptojn al Leipzig, de kie oni transsendas ilin al Paris. Tio okazigas prokrastojn en la apero de informoj kaj kelkafoje tute senvalorigas ilin.

Ĉiu do notu bone en la memoron, ke redaktejo kaj administrejo ne estas samsignifaj vortoj, ke ĉio enmetota en la gazeto devas esti ĉu prilaborata, ĉu almenaŭ kontrolata de la Redakcio — en Paris. *E. K.*


Laboristo en Pernaŭ

Mi loĝas en malgranda urbo Pernaŭ en Estonio. La loĝantaro estas proksimume 25 000 homoj. Pernaŭ estas la plej grava havenurbo en Estonio post Reval (Tallinn). La industrion prezentas deko da segejoj, linofabriko, alumetfabriko kaj kelkaj aliaj fabriketoj. Antaŭ la mondmilito funkciis ĉi tie unu el la plej grandaj ligno-kartonfabrikoj en Rusio — "Valdhof", kie trovis laboron 3000 homoj. La mondmilito faris el ĝi ruinojn kaj el ĝiaj laboristoj 3000 senlaborulojn. Nuntempe laboras la plej granda parto el Pernaŭa Laboristaro en segejoj kaj haveno, ĉar lignoeksporto el Estonio okazas plejparte tra Pernaŭan havenon. Laboro en la segejoj kaj la haveno okazas nur somere. Tiam laboristoj estas serĉataj. Dumvintre la rivero kaj la haveno glaciiĝas, segejoj ekmalfunkcias kaj la Laboristaro fariĝas senlabora. Tio ripetiĝas ĉiuvintre. Plej akra fariĝas senlaboreco en februaro, marto kaj aprilo. Tiam estas elspezita la mono, kiun oni iel sukcesis kolekti dum somero, kaj la malsato alproksimiĝas. Por iomete plimildigi la mizeron la urbestraro estas devigata aranĝi komunumajn laborojn. Tie ricevas laboron nur malgranda parto de la senlaborularo, nur tiuj, kiuj estas en la plej mizera stato, kiuj havas familiojn grandajn. Salajro estas "tro malgranda por vivi, tro granda por morti". Viroj ricevas 150 mk. est., virinoj — 100 mk. est. potage. (1 dolaro = 375 estoniaj markoj, pano = *22* mk. est. por kilogramo). Senlabora estas ankaŭ granda parto el la cerbolaboristoj. Unu mia konatulo, instruisto, perdinte aŭtune sian oficon travagis dumvintre ĉiujn oficejojn, neniun laboron li ricevis. Fine en majo li trovis laboron en segejo. Mi mem finis studojn en gimnazio kaj en komenco de aprilo ĉi jare liberiĝis de militservo. Unu monaton mi ĉie penis trovi iun laboron. Sensukcese... Fine en majo la segejoj ekfunkciis kaj mi ricevis laboron en unu el ili. Laboris mi ok horojn tage portante tabulojn kaj ricevis *24* mk. est. por horo. Laboro estis nokta. Ĝi daŭris 8 tagojn. Tiam finiĝis la krudmaterialo (traboj) kaj la segejo ekmalfunkciis por unu semajno. Dum tiu tempo espereble per la rivero alvenos traboj kaj la laboro rekomenciĝos kun du laboristgrupoj, ambaŭ po 10 laborhoroj. Unua grupo laboros de la 7-a matene ĝis la 6-a vespere, la dua — de la 7-a vespere ĝis la 6-a matene. De la 12-a ĝis la 1-a tage kaj nokte unuhora ripozo. Unu semajnon laboristo laboras nokte, alian tage. La salajro restos la sama: *24* mk. est. por horo. Tio faras proksimume 6000 mk. est. en monato. *2%* oni devas pagi por malsanulkaso. Por loĝejo kaj manĝo mi pagas 2000 mk. est. monate. Per la resto mi devos aĉeti vestaĵojn kaj ŝuojn, pagi ĉiujn aliajn elspezojn kaj fari monprovizon por la vintro. Dumvintre mi intencas fini pedagogiajn kursojn por fariĝi instruisto en komenclernejo. Por tio

mi bezonas proksimume 30000 mk. est. Kiel kolekti tiun sumon estos demando malfacila. Laboristoj en la vilaĝoj ricevas 4000 mk. est. en monato kaj loĝejon kaj manĝon senpage. Laboro intelekta ne estas trovebla. En la segejo mi laboris en iu subtegmentejo. Kiam la vetero estis bona la laborkondiĉoj estis kontentigaj. Sed malbone estis kiam pluvis. La tegmento estis tiom malbone konstruita, ke la pluvo ĉiuloke trafluis. Iu ŝercemulo diris, ke ĝi estas konstruita, por ke la suno ne brunigu laboristojn. Eble li bravis. Tre malbona estis laboro dum printempaj pluvaj kaj malvarmaj noktoj. Kelkajn noktojn mi laboris ĝis ostoj malseka, blovis malvarma vento, de tempo al tempo pluvo ŝanĝiĝis je neĝo, dentoj klakadis, la kruroj estis rigidaj. Mirinde, ke mi ĝis nun ne malsaniĝis. Sed ni devis esti kontentaj, ĉar ĉiutage multaj senlaboruloj vizitis la segejon serĉante laboron, kaj se iu laboristo kuraĝis malkontenti, li tuj estis maldungata.



Ruinoj de "Valdhof" en Pernaŭ



Pernaŭa rivero, plena je traboj

Dum la libera semajno mi ree ekserĉis laboron — sensukcese. Vendrede fine en unu segejeto oni bezonis laboristojn. Aperis deko da senlaboruloj, laboron ricevis nur kvar. Salajro *22* mk. est. por horo, labortago 10 hora. Mi preferis atendi ĝis ree ekfunkcios la segejo, kie mi komence laboris. Somere mi intencas fariĝi vilaĝlaboristo, ĉar en vilaĝo elspezoj estas pli malgrandaj ol en urbo.

SAT-ano 5574.

TAGO EL MIA VIVO

Pro la samaj motivoj kiel tiuj esprimitaj de la K-doj *2978*, 6190 kaj *2295* en iliaj artikoloj titolitaj "Tago el mia vivo" kaj "Tago el la vivo de ministo" mi verkas la jenan. Same kiel ili, mi pensas, ke serio de tiaj artikoletoj povus interesi la legantojn de "S-ulo"; miaflanke estas agrable al mi scii pri la privata vivaranĝo de ĉiusektoraj SAT-anoj.

Mi estas *23*-jara, kaj loĝas en la hejmo de miaj gepatroj, kun miaj du fratoj 19- kaj 16-jaraj. Kiel alĝustigisto, laboras mi en malgranda fabriko proksime de nia domo. Ĉiun matenon mi ellitiĝas je la sesa, vestas min kaj matenmanĝas. La laboron mi komencas je la sesa kaj duono, ĝi estas nek malfacila, nek devigas ĉiuminute cerbumadi, kaj konsistas ĉefe en preparado de diversmodelaj kalibriloj, kuplostangoj, krankstangoj k. s. Tiel mi laboras ĝis la dekunua kaj kvarono, tiam mi ĝuas 105-minutan ripozon por tagmanĝi. Je la unua la laboro rekomenciĝas ĝis la kvina, je tiu horo mi tujrehejmiĝas, manĝetas ĝis la 5,30 h. Tiam, kiam la frato



estas alveninta, ni prenas terkulturilojn kaj kune ni iras ĉu al kampo, ĉu al vinberejo, por tie fosi, pioĉi por kreskigi vinbertrunkojn, sterki, plugi (per permanaj iloj) la teron, por planti aŭ kulturi terpomojn, legomojn aŭ aliajn cerealojn, zorgi pri la arboj kaj arbetoj, senvermigi, senafisigi iliajn trunkojn kaj branĉojn printempe. Somere estas necese ligi vinberbranĉojn ĉirkaŭ la palisoj, ree pioĉi la vinbertrunkojn, la flekseblajn trunketojn de terpomoj, akvumi la semitaĵojn, la salatajn, brasikajn, rafanetajn bedojn falĉi medikagon ktp.

Aŭtune la vinberrikolto kaj la eltiro de terpomoj donas sufiĉe da laboro.

La surkampa laboro estas pli fortouza ol la fabrika, kompreneble, tamen ĝi okazas nur dum la tri supre cititaj sezonoj; vintre ĝi preskaŭ ne ekzistas, almenaŭ ĝi estas pli malofta, malpli streĉa por ni kaj ne bezonigas tiom da zorgoj pri la kreskaĵoj. Ĉiun tagon ni laboras ĝis krepuskiĝo, tio estas ĝis la oka, oka kaj duono proksimume. Post la denova rehejmiĝo, mi lavas min kaj vespermanĝas rapide. Mian dormoĉambron, kiu estas samtempe mia studoĉambro mi trafas baldaŭ, kelkan tempon mi dediĉas al legado de la leteroj aŭ ĵurnaloj (el kiuj "S-ulo" kaj "Senn. Revuo" estas preferataj) alvenintaj dum la tago, al skribado, aŭ al tralego de iu esperanta libro. Fine, pro laciĝo, mi enlitiĝas, estas la deka, ofte eĉ pli.

Ankaŭ sabate posttagmeze kaj dimanĉon matene ni laboras, tre certe ne por nia plezuro, sed por helpi niajn gepatrojn kiuj jam maljuniĝas. Miaj senokupaj horoj estas malmultnombraj kaj tiuj por propagando ankoraŭ pli maloftaj.

Kelkfoje ĉiamaj geamikoj, urbanoj kaj kamparanoj, partiaj aŭ senpartiaj, min vizitas dum la dimanĉaj posttagmezoj por frate interparoli. Scivolemaj ili estas: ĉiufoje ili petas sciigojn pri la vivo, moroj, porliberecbataloj de la laboristoj el aliaj mondpartoj ĝenerale. Mi devas konfesi, ke "S-ulo" kaj "Senn. Revuo" liveras bonajn fontojn kaj dissciigindajn artikolojn por tio.

Sed estas la novaĵoj el Sovetio kiujn ili preferas, precipe la kamparanoj, kies okuloj brilas kiam ili aŭskultas pri la vivmaniero de la sovetiaj kamparanoj, pri la helpo al ili alportata de la rusa registaro, tamen ne pri ĉiuj leĝoj kaj dekretoj ili konsentas.

Ĉiuj geamikoj bone konscias la valoron de nia lingvo por la urb- kaj kamplaboruloj, tamen ne kredu, ke ili eklernas ĝin; ne! por entrepreni la lernadon mankas al ili tempo kaj iom da kuraĝo...

15000 personoj loĝas en Rive-de-Gier, la alilandaj laborfratoj (Italianoj, Hispanianoj, Polianoj ktp., kiuj estas en granda elcento) pace vivas kun la tiea loĝantaro.

La kampara kaj urba junularo estas plejparte piedpilkludema kaj dancema, sed malmulte studema bedaŭrinde.

Al la Laboristaro de la urbo mankas organiziteco kaj unuiĝemo, malfortaj estas la sindikatoj, la senfinaj disputoj pri la diversaj tendencoj kaŭzas tion, sed frue aŭ malfrue la laboristoj de la distrikto devos unuiĝi, eĉ eble super la gvidantoj, ĉar la enlanda labordonantaro ekdirektas atakon kontraŭ salajroj kiuj apenaŭ sufiĉas.

Al la ĉiusektora SAT-anaro saluton!

Jos. Combe.

Mi estas kraĉonta sur vin: mi estas franco!...

Varma maja vespero aromas en parizaj stratoj.

Ĉesis la taga bruo de sennombraj aŭtomobiloj. Trankviliĝis la pulso de l' vivo. Nur lumegas larĝaj fenestregoj de kafejoj, antaŭ kiuj ĉe tabloj sidas alkoholemuloj kaj ulinoj atendantaj pagonton de la nokto...

Ritme paŝas kvar SAT-anoj revenante el kunveno de laboristaj esperantistoj. Ili parolas (certe esperante! ĉar unu el ili estas ekspoliano, alia eksrusiano kaj du aliaj francianoj) pri la ĵus okazinta lekcio. La vojo estas longa. Se mi estus sola, mi certe veturus per tramo aŭ per subtera fervojo. Sed nerimarkebla ĝi estas trairata en kompanio de K-doj. Ni babilas, disputetas kaj subite... subite ni aŭdas malantaŭ ni bruaron, en kiu estas distingeblaj ĝembojado de hundo, virinaj plendkrioj kaj fajfo de vipo tranĉanta aeron...

Rapida rigardo malantaŭen. Fantomsimilaj en duonlumo figuroj. Larĝŝultra viro senkompate vipas sian hundon kaj du virinoj vane admonas la kruelulon. Ni rapidas por interveni.

— Lasu la hundon! Ĉu tiel oni ĝin devas eduki?

— La hundo estas mia. Ne ŝovu do vian nazon en alies aferon!

Kaj denove kelkaj vipobatoj falas sur la dorson de l' tremanta besto. Nin tiu sceno profunde indignas. Sed la sovaĝulo senĝene komencas insulti la du kompatemajn virinojn kaj fine krias al unu el niaj K-doj.

— Mi estas kraĉonta sur vin: mi estas franco!...

Ĝuste la K-do, al kiu estis direktita tiu insultfrazo (plidecigita en esperanta traduko...), estis franciano. Li estis ekscitita, liaj okuloj brilis kaj ruĝis liaj vangoj. Kaj kun korpremo mi estis jam atendanta lian kontraŭdiron: "Ankaŭ mi estas franco!" Mi estis certa, ke li tion diros...

Li *ne* diris tion! La ekscito de l' diskuto, la indigno, — nenio forgesigis al li, ke li estas sennaciulo.

Dankon, K-do! *Ledog.*

LINGVAJ RESPONDOJ

(Plena Kolekto)

Unu volumo in-8, 92-paĝa **1.— mk. g.**

Multfoje petoj estis faritaj al D-ro Zamenhof, ke li klarigu kelkajn gramatikaĵojn aŭ lingvistikajn demandojn. Ĉiam li respondis bonkore. Pli ol 100 respondoj estis tiel faritaj de li, kaj estis iom post iom publikigitaj en *La Esperantisto* (1889—1893); *La Revuo* (1906—1908); *Oficiala Gazeto* (1911 — 1912). Ili aperas nun en tiu verko logike ordigitaj kaj kun devenaj referenzoj. Kvankam ili devas esti konsiderataj kiel oficialaĵojn, laŭ deziro de Zamenhof, konfesinde estas ke ili multe utilas al legantoj.

Havebla ĉe Administracio de SAT.

Lernejo en Sovetio

En nia ordinara 7-jara lernejo ne estas klasĉambroj, sed studejoj por sociologio, naturscienco, matematiko, fiziko, kemio, rusa lingvo, geografio, arto (desegno) kaj por fremdaj lingvoj (la germana estas deviga). Inter lecionoj la lernantoj troviĝas en la salono, kiu estas ventumata dum lecionoj. Multaj organizoj estas en la lernejo: esperantorondeto, sporta, drama, ŝaka, desegna, radia kaj de junaj naturscienculoj. Ĉi lasta movado estas plej larĝa en la lernejoj kaj havas sian organizan centron en Moskvo.

La sankomitato pere de deĵorantoj prizorgas la higienon de gelernantoj. Por kunsidoj de organizoj estas dediĉita ĵaŭdo, t. n. kluba tago. Ni havas duonkluban ĵaŭdon t. e. ni havas duonon da lecionoj kaj poste sekvas la kunsidoj. Ĉiu grupo (klaso) havas kiel grupgvidanton instruiston. Ĉiuĵaŭde la grupo kunsidas kaj priparolas la demandojn poste solvotajn dum kunsido de la grupreprezentantoj kaj dum ĝenerala kunveno de lernejo. Oni diras ke memorganizeco kaj memagemo ĉe ni estas bonaj — la nomo devigas: nia lernejo estas je la nomo de la 3-a Internacio pri kio ni fieras.

Nia vivo respeguletas en nia mur-



gazeto "Voĉo de lernejano". Ju pli multe la postlimaj geamikoj sendos por nia murgazeto da interesa materialo, des pli vigla, estos la peresperanta laboro, des pli efika estos poresperanta propagando, ŝatas ... nek nia lernejestro, kiun nek la instruistino de germana lingvo. *E.*

Virina movado en Japanio

Tiu ĉi malgranda artikolo estas rapida skizo de virina movado en Japanio. Japanaj virinoj ankoraŭ ne akiris tion, kion eŭropaj virinoj jam delonge ĝuas.

Politike ekzistas virina organizo kiu celas akiri elektrajton por virinoj. Tiuj virinoj kiuj havas saman talenton kaj kulturon kiel viroj, ne havas elektrajton. La leĝo pri universala baloto, kiu jam pasis la parlamenton, esceptas virinojn. La organizo havadas tre malfacilan bataladon, sed komitatanoj per senĉesa laborado kaj nelacigebla energio penadas akiri elektrajton por virinoj.

En edukado ankaŭ estas virina organizo kiu celas akiri egalan rajton kiel viroj en edukado. Al virinoj ne estas permesite ricevi saman ŝancon en edukado. Jam en knabina liceo oni ne donas saman edukadon kiel al knaboj, kaj tial en kolegio knabino ne povas akiri egalan ŝancon. La celo de organizo estas unue akiri por knabinliceanoj egalan ŝancon kiel knaboj en ĉiu leciono.

Moralflanke ekzistas diversaj virinaj organizoj i. a. organizo celanta forigi la sistemon de publikaj prostituistinoj kaj organizo por abstinenco de vino kaj tabako jam staras sur firma bazo kaj tre vigle agadas.

En laborista flanko, malgraŭ la mallonga historio de japana labormovado, pioniraj laboristinoj jam multe laboradas kiel anoj de virina fako de Laborunio, kaj ili kun miriga pacienco, sub persekutado, batalas por la bono de sia klaso.

Estis organizo de virinaj socialistoj kiu multe celis fari, sed pro severega persekutado jam ĉesis esti organizo, sed tiamaj membroj tre vigle laboradas ĉiam klopodante veki virinojn al klaskonscio, kaj ĉiam helpante proletarian movadon aŭ per plumo aŭ per aktuala agado. Tiuj virinoj kvankam ili mem ne organizas iun rondeton, tamen estas veraj pioniroj kaj batalantoj kiuj gvidas ideon kaj movadon de progresintaj virinoj.

Estas tre bedaŭrinde ke tiuj pioniraj virinoj kiuj aŭ formas aŭ ne formas organizon estas tiel okupitaj, ke kvankam inter ili troviĝas multaj kiuj aprobas kaj havas deziron lerni esperanton, al ili tute mankas tempo lerni ĝin, ĉar la plimulto el ili havas regulan okupon, (ĉiu ĉefa gvidantino havas memstaran vivadon per ia mensa aŭ korpa laboro), kaj iliaj laboroj kiel membroj de organizoj al kiuj ili apartenas estas kroma laboro, kaj tio postulas tiom da tempo de ili. Estontaj esperantistinoj venos el studentinoj kiuj havas tempon por lerni nian lingvon.

K-dino Macue Sasaki.

La mezklasuloj, la et-industriisto, la etkomercisto, la metiisto, la kampkulturisto, ĉiuj kontraŭbatalas la burĝaron por eviti ruiniĝon kaj formalaperon — — — ili estas reakciuloj, ĉar ili provas turni en inversan direkton la radon de l' historio.

K. MARKS.

SENNACIULA RADIO-PAĜO

Konstruu ĝin!

(Daŭrigo el n-o 135)

Lokigo de la diversaj partoj

En la konstruo de radioaparatoj la facileco kaj la sukceso de la laboro duone dependas de la bone primeditita plano de sinsekvaj laboreroj.

Komence faru sur papero en natura grandeco planon de borado de la ebonita plato. La donata fotografaĵo kaj la plano de konektoj klare vidigas la dislokigon de la apartaj pecoj. Ĝi estas eventuale ŝanĝebla. La plano devas esti tre zorgeme farita, por ke la kondensatoro, la bobenportiloj, la reostato kaj la bornoj estu facile fikseblaj. Tiun ĉi planon almetu al la polurita flanko de la ebonita plato kaj per punktilo indiku la centrojn de borotaj truoj. Poste traboru la eboniton per boriloj de konvenaj diametroj. Estas notinde, ke ebonito estas facile rompebla; tial oni devas meti sub ĝin dum la borado tute ebenan lignan platon. Ne forgesu la truojn por la ŝraŭboj, fiksontaj la ebonitan platon al la ligna!

Kiam *ĉiuj* truoj estas traboritaj, fiksu la kondensatoron, la reostaton, la bobenportilojn kaj la bornojn; fiksu la ebonitan platon al la ligna (sur kiu devas esti alŝraŭbita la lampportilo) kaj faru ĉiujn konektojn, sekvante la ĝeneralan planon de l' konektoj (fig. *2* kaj *3*) kaj la principan skemon (fig. 1). Antaŭ la funkciigo bone rekontrolu ĉiujn konektojn. En 99 okazoj el 100 la kaŭzo de malbona funkciado estas ne sufiĉe bona kontakto.




Fig. 4. — Ekstera aspekto de la ricevilo. Maldekstre la tri bornoj "anteno, longaj ondoj", "anteno, mallongaj ondoj" kaj "tero". Apude, la tri bobenoj: supre, la reakcia bobeno (movebla); meze la krada bobeno (fiksa); malsupre, la antena bobeno (movebla). Dekstre la turn-butonoj de la reostato (supre) kaj de l' variebla kondensatoro (malsupre); la bornoj "— 4 v.", "+ 4 v. — 80 v.", "+ 80 v." kaj la du bornoj de l' telefonaŭdilo. Kiel oni vidas, la tuta ricevilo estas entenata en eleganta kesteto.

Funkciigo de la ricevilo

Por funkciigi ricevilon tiamaniere preparitan, necesaj estas du baterioj (piloj aŭ preferinde akumulatoroj), unu de 4 voltoj kaj unu de 80 voltoj; plue ŝparlampo, telefonaŭdilo kaj bobenoj. La bornojn "+ 80 v.", "— 80 v.", "+ 4 v." kaj "— 4 v." konektu kun la koncernaj bornoj de la baterioj (la negativa borno de la 80-volta baterio kaj la pozitiva de la 4-volta koincidas). Tiuj ĉi konektoj eksteraj al la aparato estu nepre faritaj per *izolita* fadeno. Poste fiksu la telefonfadenojn al la du indikitaj bornoj kaj metu la lampon sur la lampportilon, atente observante, ke la kontaktiloj de filamento, krado kaj anoda plato eniru la ĝustajn kontaktingojn. Kontaktigu la terkonekton kun la borno "tero".

Por ricevado de longaj ondoj (1000 ĝis 2000 metroj) fiksu la fadenon de l' anteno al la borno ALO (Anteno, Longaj Ondoj). En tiu ĉi okazo sufiĉas nur du bobenoj: unu de la reakcio (supera movebla portilo), havanta 120—150 turnojn de fadeno; alia en la krada cirkvido (meza fiksa portilo) de 120, 150 aŭ 250 turnoj. Ne estas eble doni pli precize la nombron de la turnoj, ĉar ĝi dependas de la longeco de l' anteno kaj de ĝia kapacito (ju pli grandaj estas tiuj du valoroj, des pli malgranda devas esti la nombro de la turnoj).

Por mezaj (600—1000 metroj) kaj mallongaj ondoj (250—600 metroj), la antenon fiksu al la borno AMO. Oni tiam bezonas tri bobenojn: 1e por mezaj ondoj, reakcia bobeno (supra) de 50—75 turnoj, meza (fiksa) bobeno de 50—75 turnoj, malsupra bobeno de 30—45 turnoj; 2e por mallongaj ondoj, supra bobeno de 30—40 turnoj; same la meza; la malsupra de *22* turnoj.

Tiu ĉi lasta agordsistemo, kiun oni nomas "la skemo kun neagordita anteno" ebligas la ricevadon eĉ de tre mallongaj ondoj. Krome ĝi estas tre selektiva (t. e. oni povas per ĝi elimini ĝenantan stacion). Oni povas ĝin uzi ankaŭ por la ricevo de longaj ondoj, prenante por tio sufiĉe grandan mezan bobenon.

Enmetinte fine la bobenojn, eklumigu

(Daŭrigo pĝ. 6.)




Fig. 3. — Ĝenerala plano de l' konektoj. Tiu ĉi figuro prezentas pli klare la fadenaranĝon videblan sur la fotografaĵo de fig. 2. Oni rimarkos, ke sur la fotografaĵo kaj ankaŭ sur tiu ĉi klariga figuro la rezistaĵo de 3 megomoj kaj la kondensatoro de 0,00015 mikrofarado estas kunigitaj en unu tubeto (dekstre supre). Se oni disponas nur apartajn rezistaĵon kaj kondensatoron oni simple muntos ilin paralele en la sama loko, kiel montras la principa skemo fig. 1.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

Projekto de programo

de SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) Proleta Esperanto-Organizo Unuecfronta por interservo kaj kultureduko reciprokaj.

(Daŭrigo)

II. ESPERANTO KAJ PROLETARO

1. Esperanto eniras la socian vivon

La vasta tutmonda movado, kreita de la lingvo esperanto, jam delonge ĉesis esti nur pure lingva, sed transirante sur la socian kampon, ĝi penetris ĉiujn sociajn klasojn, kiuj nature ĝin praktike uzas por siaj klasaj interesoj.

2. Lingvo universala, produktaĵo de kapitalismo, sin turnas kontraŭ sian kreinton

La kapitalismo, kies senlima etendiĝo kreis la bazon por liberigi la homaron kaj por unuigi la popolojn dividitajn, ne povas mem plenumi tiun taskon, ĉar ĝiaj internaj kontraŭdiroj pli kaj pli akriĝantaj — inter produktado kaj distribuado, inter kapitalo kaj laboro, inter produktadordo socia kaj propraĵ- kaj alproprigsistemo privata, inter tuteco de mondekonomio kaj malvastaj grupinteresoj — ĵetas la sistemon de krizo al krizo kaj de internacia milito al internacia milito. Tiel la kapitalismo detruas periode, per teruraj mondmilitoj, la ĝermojn kaj radikojn, de ĝi mem kreitajn, de tuthomara kulturo. Pro tiu duobla karaktero de la kapitalista kulturo, esperanto en la manoj de la burĝa klaso povas esti nur trompo, blufo aŭ ludaĵo; kaj en tiuj okazoj, kie la burĝaro esperanton serioze uzas, ĝi utiligas ĝin por siaj klasaj celoj *kontraŭ la Proletaro.*

La espero, ke la kapitalismo ĝenerale utiligos esperanton por la bono de l' homaro, estas naiva iluzio. Esperanto ne povas esperi sukceson per klaso, kies intereso estas *milita* internacieco. Kaj esperanto estas mem dutranĉa glavo en la manoj de la ekspluatistoj, ĉar lastfine la uzado de lingvo universala eĉ flanke de burĝaro plifortigos la internaciajn, kontraŭkapitalistajn tendencojn en la popolamasoj.

3. Esperanto je servo de burĝaro

Naciaj ŝovinistoj per esperanto faras nacieman propagandon por siaj respektivaj registaroj kapitalistaj. Pastroj ĝin aplikas por disvastigo de la ekleziaj trompoj, por stultigo de la popolo per ĉielaj sensencaĵoj kaj por ŝirmado de la reala, surtera ekspluatado kapitalista. Policanoj ĝin uzas por pli efike persekuti la proletajn batalantojn sur internacia skalo. Burĝaj pacifistoj ĝin utiligas por disvastigi la trompajn ideojn de interklasa harmonio kaj de tiel nomata "interna ideo de esperanto", celante solvi ĉiujn sociajn kaj naciajn malfacilaĵojn de la nuntempo per enkonduko de esperanto, kaj klopodas tiel deturni la atenton de la Laboristaro de ĝiaj klasaj interesoj.

4. Esperanto je servo de Proletaro

Esperanto povas atingi siajn celojn en la kultura vivo de la homaro nur en la manoj de klaso vere tutmonda, kies aspiro al liberigo ne estas iluzio aŭ trompo kiel tiu de la burĝaj pacifistoj kaj de la eklezio. Tial la sola klaso, kiu kapablas realigi la ĝeneralan uzadon de lingvo universala, estas la *laborista klaso.*

Enkonduko de lingvo universala grave faciligos la interpopolan kontakton de la malsupraj tavoloj de la popoloj; lingvo universala al ili malfermos larĝajn perspektivojn en tutmonda skalo. Lingvo universala jam nun fariĝas pli kaj pli necesa por la Proletaro en la kadro de la kapitalista sistemo, pro la senĉesa kreskado de la interpopolaj ligiloj. Ĝi fariĝos nepre necesega en la socio bazata sur libera laboro sen ekspluatado, al kiu aspiras kaj por kiu batalas la Proletaro klaskonscia.

Esperanto en la manoj de la laborista klaso estos potenca armilo en la klasbatalo.

III. SAT KAJ ĜIAJ CELOJ

1. Esperanto je la servo de la proletaj klasorganizoj

Meti en la manojn de la laborista klaso la potencan armilon esperanto por la klasbatalo — jen la historia funkcio de SAT.

La diversaj klasbatalaj organizoj proletaj pli kaj pli akre sentas la mankon de universala lingvo; al ili sin turnas SAT, *proponante siajn servojn,* sed samtempe ilin atentigante, ke ili plene profitos el ĉiuj utiloj de esperanto *nur tiam, kiam ili mem rekomendos kaj favorigos la ĝeneralan lernadon kaj utiligadon de tiu lingvo.*

Sed jam antaŭ atingo de tiu lasta kaj ĉefa celo: oficiala akcepto de esperanto kaj ĝia uzado en la klasaj organizoj pro-

---

la lampon, turnante de maldekstre dekstren la maneton de l' reostato kaj turnu malrapide la kondensatoron. Kiam la dezirata telefonio estas iom aŭdebla pli-aŭ mal-proksimigu la reakcian bobenon al la fiksa, serĉante la pozicion, kiu donas la maksimuman potencon de aŭdigo (antaŭ aŭ post la karakteriza fajf-sono de l' "oscilado"). Perfektigu la agordon per la variebla kondensatoro.

Se la reakcia bobeno estas tro proksima al la agordbobeno (fiksa), en la telefono estas aŭdebla terura blekego. En tiu momento via ricevilo fariĝis vera sendilo kaj treege ĝenas ne sole vin, sed ankaŭ ĉiujn najbarajn radioamatorojn. Estu ĝentila kaj malproksimigu la reakcian bobenon!

Se dum la unuaj ekprovoj la priskribita fajfado tute ne estas aŭdebla, eĉ kiam la reakcia bobeno estas tute proksima de la agorda bobeno, inversigu la konektojn de la reakcia bobeno, t. e. fiksu al unu kontaktingo la fadenon, kiu estis fiksita al la alia, kaj male.

Ankoraŭ unu atentindan konsilon. Se vi estas komencanta amatoro, por la unua ekprovo invitu al vi pli spertan radiiston. Vi ja riskas forbruligi la multekostan lampon, dum li scias, ĝis kiu grado oni devas ĝin varmigi.

Por perfektigi vian ricevilon restas nur enmeti ĝin en belan kesteton (vidu la fotografaĵon fig. 4). *RADIULO.*

*

Okcidenteŭropaj SAT-anoj povas aŭdi Moskvon!

La potenca moskva stacio en la nomo de Komintern (ondolongo 1450 m) estas bone aŭdebla en okcidenta Eŭropo. Ofte ĝi faras esperantajn disaŭdigojn. Ĉiudimanĉe matene (sovetiaj K-doj, sciigu nin pri preciza horo laŭ MET!) estas disaŭdigata el ĝi "Radioamatoro", esperanta gazeto parolata. Ĉiudimanĉe vespere je la *22* h. laŭ MET (21.00 T. U.) K-do Ĵavoronkov faras el ĝi esperantan kurson (kies lecionojn regule enpresas la ĵurnalo *"Piŝĉevik").*

Laŭ informo de *L' Humanité* la francaj stacioj penas miksĝeni la ricevadon de la moskva stacio... Burĝa kompreno pri la libereco de l' etero...

Ĉiu ekstersovietaj K-doj aŭdantaj la stacion de Komintern bonvolu skribi pri tio al K-do V. Ĵavoronkov, Moskvo, Poŝtkesto 701.

*

La radioeklezia "agitpropo"

Konstante zorgante pri la savo de niaj pekaj animoj, la francia ĉefepiskopejo estas haltigata per neniaj elspezoj. Ĝi pagis 10 000 frankojn al la estraro de la radiostacio "Radio-Paris", por havi rajton fari ĉiudimanĉe perradiajn predikojn disaŭdigatajn de tiu ĉi sendilo. Tiamaniere dum ŝia sola libera tago la francia laboristo, povas ĝui ĉiujn ĉarmojn de la mieldolĉa voĉo de pastro-oratoro. La justeco igas nin noti, ke la parolantoj posedas vere bonan oratoran talenton, la poste sekvanta ĥormuziko estas tre bela kaj tial la propagando fariĝas danĝere efika. Malfeliĉaj cerboj de respublikaj civitanoj! Eĉ per radio oni penas vin kripligi!..

letaj — SAT praktike povas meti sian lingvon je la servo de la proletara klasbatalo:

a) SAT metas sian gazetaron je dispono de la laboristaj organizoj;

b) SAT funkciigas informservon tutmondan je la profito de diversspecaj asocioj de la Proletaro:

c) SAT servas kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj laboristaj.

2. Sur frontsektoro de interpopola interligo, sur kultura kampo

a) por sennaciismo

En la ĝenerala proleta luktado, SAT estas kultura batalorganizo sur la frontsektoro de interpopola interligo. Dum aliaj proletaj organizoj konsideras kiel sian specialan taskon politikan, sindikatan aŭ kooperativan agadon, korpkulturan kaj sportan edukon ktp., la laborista esperanto-movado, koncentrita en SAT, havas sian ĉefan batalkampon en la kontraŭnaciema luktado; instruante kaj klerigante, SAT zorgas kutimigi sian anaron — kaj per sia anaro la klason — al *eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo,* celante per tio eduki la specon de la plej bonaj el la tiel nomataj "internaciistoj"; ĝi celas plifaciligi la interrilatojn de siaj membroj, kreskigante ĉe ili per daŭra korespondado, de fabriko al fabriko, per vojaĝoj ktp., fortikan senton de homeca kaj klasa solidareco, spiritostaton harmoniantan kun la estonta socio, kiam la sociordo nuna, la ekonomiaj, ŝtataj kaj naciaj limoj ne plu ekzistos.

b) kontraŭ imperialistaj militoj

Fidela al tiu sia historia rolo, SAT batalas en intima komuneco kun la aliaj klasorganizoj proletaj kontraŭ la imperialistaj militoj, en kiuj la kapitalista socio portas ĝis frenezeco la nacieman spiriton kaj devigas proletojn diversnaciajn al malamo, mortigo kaj buĉado reciprokaj.

c) kontraŭ dogmoj

Batalante kontraŭ ĉiuj militoj estigataj de la bezonoj de la ekspluatantaj klasoj, SAT nature batalas ankaŭ kontraŭ la restaĵoj de dogmeca spirito, kiu ankoraŭ nuntempe disigas profunde la popolojn, pliakrigante nacian dividecon kaj plifaciligante ekspluaton kaj subpremon de unu popolo flanke de alia. Penante perigi al siaj membroj la novan sciencecan kulturon tuthomaran, SAT ignoras la senbazan kredon je dio, rekomendas al siaj membroj ne esti anoj de iu ajn eklezio kaj atentigas ilin pri ilia morala devo eduki siajn infanojn laŭ scienceca mondkoncepto.

(Finota.)

Fermu viajn leterojn per niaj sigelmarkoj. Prezo: 100 pecoj 1.— mk. g.
Administracio de SAT.

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

La unuamajaj festoj estis larĝe uzitaj de multaj SAT-anoj por propagando de niaj ideoj. Sufiĉas rigardi la "Memornoton" de hodiaŭa numero por vidi kiom da SAT-aĵoj entenadis la numeroj de 1. 5. 27 de diversaj gazetoj. Ankaŭ kelkaj londonaj SAT-membroj k. anoj de Lab. Esp.-Klubo partoprenís la manifestacion en Hyde Park la 1. majo. Kun ili ĉeestis kelkaj japanaj K-doj. Tre atenteme la multnombra ĉeestantaro aŭskultis anglan k. esp-an paroladon de K-do D. Sheriff invitinta la ĉeestantojn al studado de esp-o. Samtempe la parizaj SAT-anoj partoprenadis multmilan laboristan kunvenon en Pré St. Gervais, kie bona propagando per paroladetoj k. flugfolioj estis farita.

Pli k. pli la anoj de naciaj lab.-esp-aj organizoj konscias la neceson aliĝi al sennacieca tutmonda organizo. Tiel ekz., en Bournemouth (Anglio) post fino de esp-a kurso estas fondita "Laborista Esperantista Klubo de Bournemouth'a Distrikto", laŭ kies regularo *ĉiu ĝia membro devas esti ankaŭ SAT-ano.* La kunvenoj de la klubo okazas alterne en Bournemouth k. Christchurch. Dank' al energia laboro de lokaj K-doj la nombro de SAT-anoj en distrikto triobliĝis kompare kun lasta jaro (nun 24). Sekretario de la klubo estas K-do L. E. Hessé. Simile en Bremen post fino de kurso fondiĝis LEA-grupo kies ĉiuj anoj (12 p.) *aliĝis al SAT.* Atentu ĝian anoncon en "Korespondado". Fine el Ĉes. Budejovice oni informas nin, ke SAT-aniĝis preskaŭ ĉiuj membroj de "La Progreso", lab.-esp-a klubo vigle propagandanta inter laboristoj de suda parto de Ĉekoslovakio. Ankaŭ la 15 partoprenantoj de la organizita de ĝí kurso en Mladé intencas SAT-aniĝi post fino de la kurso. En aŭtuno "La Progreso" aranĝos tutregionan propagandan ekspozicion. Ĉiuj K-doj vizitontaj la II. Lab. Gimnastikan Olimpiadon en Praha, bv. afable viziti "La Progreso'n" en Ĉes. Budejovice (Dvorákova Protivinska pivnice. Jiĵkova str. 30).

En Francio la laboro pliviglîĝas. Duobliĝ-la lab.-esp-istoj estas iafoje malhelpataj. grupo dank' al ĉiulandaj interesaj paroladoj. En Grenoble grava organizo de eksmilitintoj "Fédération Ouvrière et Paysanne des Mutilés", sekcio Dauphiné-Savoie, aldonis al la aliaj siaj celoj "la propagandon por internacia lingvo esp-o". En Lyon la Lab.-Esp. Grupo organizis Zamenhof'an memorfeston dum kiu parolis K-do 132. Ĉeestis 41 K-doj. 24. 4. 27 en teatraĵo prezentita de lab. kanta grupo aŭdiĝis esp-a kanto "Proletoj, unuiĝu!" k. diversaj deklamaĵoj pri esp-o. Imitinda propagandmetodo!

Kontraŭe, en Perpignan la francia polico malhelpas laboron. En apr. ĝi elfranciigis kvar K-dojn vizitintajn la esp-an kurson; ilia sola kulpo k. "krimo" estas, ke ili ĉiam estis klaskonsciaj lab-istoj. La forpelitaj K-doj devas eliri el Francio per Belgia landlimo. Se belgiaj K-doj hazarde renkontos ilin, nepre ili ĉiel helpu la helpindulojn.

Ankaŭ en alia "respubliko", en Germanio, la lab.-esp-istoj estas iafoje malhelpataj. Ekz., en Schweidnitz la sindikata komitato de "liberaj sindikatoj" malpermesis la portadon de esp-a standardo de Lab.-Esp. Grupo dum unumaja manifestacio. K-doj ekstergermaniaj! Sciigu la Esperanto-Informejon en Schweidnitz kiajn standardojn kaj afiŝojn oni uzadis en via urbo dum la unuamaja festo. Cetere la Schweidnitz'aj SAT- k. LEA-grupoj vigle kunlaboras. 9. 4. 27 okazis publika kunveno "Por libera Ĉinio!" en kiu i. a. parolis K-do So el Ŝanĥaj. Li tre interesiĝis pri SAT k. esp-o k. promesis varbi por nia afero en diverslandaj proletrondoj.

En Sovetio kiel ĉiam nia movado progresegas. Inter multaj aliaj estas notindaj sekvantaj faktoj. En Perm la redakcio de l' gazeto *Zvezda* starigis esp-o-konsilejon, letere helpontan la studadon de la lingvo k. organizadon de lab. korespondado. La distrikta kongreso de lab. gazetkorespondantoj rezoluciis pligrandigi "Anguleton de Int. Ligo" en *Zvezda.* Eklaboris esp-a rondeto en fervojista klubo.

En Minsk 14. 4. 27 Zamenhofa memorvespero en salono de centra partia klubo. Ĉeestis pli ol 200 p. Lekciis K-doj Kirjuŝin, Sapirŝtejn k. Fajnzilber. Sekvis deklamado kaj ĥorkantado. Al Zamenhofa memortago estis ankaŭ dediĉitaj du numeroj de esp-a radio-gazeto. Ĉi gazeto estas disaŭdigata ĉiumerkrede de 22 ĝis 22,45 h. laŭ MET (21,00—21,45 T. U.) el Minska radiostacio (ondolongo 860 m); ĝi pritraktas en- k. eksterlandan lab. movadon. K-doj aŭdantaj ĝin skribu pri tio al Minska stacio.

(Kompilite laŭ multaj leteroj).

*

NIA POŜTO

T. Cortés Barcelo. — *La "paneŭropa" movado ne povas multe interesi sennaciulojn, kiuj ja havas pli larĝan kaj klaran ideologion. Sekve ni ne povas publikigi vian artikolon.* *E. L.*

5199. — *Ni konsentas vian proponon, sed ni ne efektivigu ĝin tuj ĉe la komenco de la afero. Ni atendu por sciiĝi ĉu la laŭdinda "fantaziuleco" daŭros. Almenaŭ vi mem ne prokrastu havigi al ni la necesan aĵon.*—E.L.

5221. — *Vian leteron ni sendis al K-dino M. S.* — Adm.

Wakamatsu-Tokio: *Via respond-kupono ne valoras. Koresp.-anonco kostas 0,50 gmk.* — Adm.

*

NEKROLOGO

La multaj SAT-anoj, kiuj konis K-don
ARMANDO KOHN (982)
ekscios kun ĉagreno pri lia morto, okazinta la 12-an de majo, post longa pulmomalsano.

Forkurinte el Hungario, nia juna K-do travivis multe da malagrablaĵoj en diversaj landoj. De pli ol tri jaroj li estis en Francio. Kiam li estis sana li tie vigle kaj entuziasme propagandis por nia afero.

Per tiu morto SAT perdas unu el siaj plej bravaj batalantoj. Ni ĉiuj memoru pri li kaj imitu lian fervoron. *La Parisa grupo.*

Ĉe la neŭtraluloj.

Paco per Lernejo

La 16.—20. apr. okazis en Praha la konferenco "Paco per Lernejo" organizita de la Internacia Oficejo pri Edukado. Proksimume 500 delegitoj el 18 landoj ĉeestis ĝin inter ili ankaŭ D-ro Beneŝ (ministro de eksteraj aferoj) kaj D-ro M. Hodza (ministro de edukado). Multaj oratoroj parolis senpere en esp-o. Aliaj paroladoj estis tradukataj sed *nur* en esp-on. Radiodisaŭdigo de la paroladoj kaj gazetaj raportoj havis bonan propagandan efikon.

Elektoj en la Lingvan Komitaton

Voĉdonintoj: 107. Estas elektitaj:
Novaj membroj: S-ro Cogen (101 voĉoj).
Elirintaj membroj: S-roj Lundgren (99 v.), Krestanoff (98 v.), Grau Casas (Josep) (97 v.), Török (95 v.), F-ino Pulvers (93 v.), S-ro Blok (91 v.).

Geografio per esperanto

Konataj pedagogoj, inter alie Prof. Bovet de la Instituto J. J. Rousseau en Ĝenevo, jam rekomendis la instruadon de geografio per esp-o. Oni anoncas en tiu ĉi kampo tre interesan verkon, rezulton de kunlaboro inter Aŭstraliano kaj Finnlandano "Aŭstralio, Lando kaj Popolo", kiu baldaŭ aperos en eldonejo Hirt & Sohn. *(Laŭ I. E. S.)*

La Lingva Angulo

ATENTIGO. — Ni ricevis lastatempe multajn "demandojn pri kiuj estas tute facile trovi respondojn en gramatiko aŭ en vortaro. La K-doj, kiuj deziras akiri fundan scion de nia lingvo devas nepre posedi la "Lingvaj Respondoj"-n de Zamenhof kaj la vortaron de Kabe. (Ambaŭ libroj estas haveblaj ĉe nia Adm.)

Fakulo estas tre okupata homo, al kiu ni submetu nur "demandojn" pri kiuj ne estas troveblaj kontentigaj respondoj en la menciitaj verkoj. Ni havas la bonŝancon, ke vera kompetentulo en la lingva fako konsentas profitigi al esperantistaj laboristoj sian sciencon, ni ne trouzu lian dankindan bonvolemon.

KOREKTO. — Kelkaj korespondantoj rimarkigis, ke en la n-ro 47 de "La Lernanto", en la respondo 2-a, troviĝas jena eraro: "*Neniu . . . ne*". Ni dankas al la rimarkintoj kaj gratulas ilin pro la atento kun kiu ili legas la "respondojn". Necesas nur diri, ke ni opiniis nenecese korekti la eraron, kiun ni mem rimarkis, en la sekvanta n-ro de "S-ulo", tial ke evidentas, ke la "eraro" estas ĉu presaro, ĉu *lapsus kalami* (plumeraro). En plej elementaj kursoj oni ja instruas, ke du neoj egalvaloras aserton[1]). Kaj ni vere miris konstatante, ke pro tia "eraro" unu korespondanto nomas nian eminentan kunlaboranton pri lingvaj aferoj "malfakulo"!!!

Plej grava kaj bedaŭrinda eraro estas *cerberaro*, t. e. malbone juĝi. Tiajn erarojn ja ne estas eble korekti. *E. L.*

Demandoj:

1. Ĉu bonaj estas la frazoj: "Ĝis Revolucio ili lernis nur en monaĥejoj" ("S-ulo„ n-ro 121—122, frunt-artikolo) kaj "ĝismarksa socialismo" (Karl Marx, lia vivo kaj lia verko", pĝ. 12, 1, 5)? Ĉu ne pli bone estus meti "antaŭ" anstataŭ "ĝis"? Ĝenerale bonvolu klarigi diferencon inter la vortoj "ĝis" kaj "antaŭ" rilate tempon, ĉar nun svarmas dubindaj esprimoj kun "ĝis". Sepduok.

2. Ĉu preferinda estas la nova formo "ĉino" anstataŭ la Zamenhofa vorto "ĥino", kiu same sonas en la lingvoj latina, germana kaj pola? Sepduok.

3. Kiel traduki esperanten la vorton "matras" (fr.) = "Kolbe" (germ.)? Sepduok.

Respondoj:

1. ANTAŬ esprimas tempon, momenton pli fruan ol alia. ĜIS esprimas, ke movo, ago atingas punkton en la spaco aŭ tempo.

La cititaj frazoj estas bonaj, ĉar klaraj. En multaj tiaj frazoj oni povas uzi sendiference ĜIS aŭ ANTAŬ. Rimarku tamen, ke ĝenerale la prepozicio ANTAŬ estas preferinda, ĉar pli klara. Tre ofte la uzado de ĜIS anstataŭ ANTAŬ estas naciismo.

2. La demando pri la geografiaj nomoj ne estas definitive solvita. Estas malfacile, eĉ neeble diri, ĉu ĤINO estas pli bona ol ĈINO; tio dependas de la persona gusto. Tamen, ĝis definitiva decido, estas pli singarde uzi la Zamenhofajn formojn.

3. La vorto MATRAS estas pure teknika kaj plej multaj francoj, eĉ tre kleraj, ne konas ĝin aŭ ne konas ĝian signifon. Bonvolu do vin turni al faka teknikisto. *Fakulo.*

---

[1]) Ĉi okaze estas tamen interese noti, ke en la Zamenhofa traduko de "Hamlet", akto 1, sceno 5, oni trovas jenan esprimon: "Metu viajn manojn denove sur la glavon, kaj ripetu, ke vi *neniam* al *neniu* diros pri la apero de la nokto".

Tiu esprimo estas eble eraro gramatike, sed stile ĝi estas pli esprimforta, pli bone spegulas la originalon kaj sekve estas pli . . . korekta. *E. L.*

★ DIVERSAĴOJ ★

URĜA ALVOKO

Karaj Kamaradoj ĉiulandaj!

La 12—13-an de junio Sverdlovska distrikta Komitato de Sovetlanda Esperantista Unio kunvokas Unuan Tuturalan konferencon de geesperantistoj por fondi fortikan regionan esperantan organizon. Dum la konferenco ni aranĝos ankaŭ esperantan ekspozicion. La konferencon partoprenos reprezentantoj de partiaj, sindikataj kaj aliaj sociaj regionaj, distriktaj, urbaj organizoj neesperantistaj.

La konferenco kaj la ekspozicio devas evidente montri kiom granda kaj forta estas esperanta laborista movado en la mondo, kiom utila ĝi estas por tutmonda gelaboruloro.

Sendu por la konferenco salutleterojn de viaj organizoj kaj ekspoziciaĵojn.

Ĉiujn Gek-dojn diverslandajn, kiuj korespondadas kun Sverdlovskanoj, Permanoj, Motoviliĥanoj, Kurgananoj, Krasnoufimskanoj, N.-Tagilanoj kaj kun alilokaj Uralaj geesperantistoj, ni aparte petas pri urĝa sendo de salutleteroj kaj ekspoziciaĵoj.

La konferenco estas baldaŭ — ne prokrastu!

La adreso estas: "USSR, Sverdlovsk, poŝtkesto n-o 174, al Jeleznjakov.

Komisiite B. Jeleznjakov (5583).

Ĝusta sugestio

K-do 2144 tute prave atentigas nin pri sufiĉe grava manko de niaj korespondanoncetoj: la anoncantoj preskaŭ neniam indikas sian profesion. Tial ofte estas tute vane komencata korespondado baldaŭ ĉesas pro manko de komunaj profesiaj interesoj. Tion devas atenti SAT-perantoj akceptantaj la anoncojn kaj ĉefe la anoncantoj mem.

KORESPONDADO

TARIFO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernanta la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

Linz-a SAT-rondo dez. koresp. k. grupoj k. izoluloj pri div. temoj k. ĉ. l. Ni ankaŭ petas ĉiul. helpemulojn sendi al ni materialon por somera ekspozicio. Resp. garantiata. Adr.: K-do *J. Oeller,* Hafnerstr. 21, *Linz a. D.*

K-do *E. Spangenberg,* Arbeitergasse 9, *Wiener-Neustadt,* dez. interŝ. PM, k. koresp. k. ĉ. l.

K-do *Johann Bauer,* Kramgasse 12, *Regensburg,* dez. koresp. k. ĉ. l. PI, bfl. Resp. garantiata.

K-do *Friedrich Strasser,* Erhardigasse 13, I, *Regensburg,* dez. koresp. k. ĉ. l. PI, bfl. Ĉiam resp.

Belgio.

— Tramistoj Atentu! 45 tramistoj, lernantaj esp. dez. koresp. k. ĉiul. samprofesianoj. Adr.: K-do *J. Lebacq,* Esperanta Kurso, Maison Syndicale 17, Rue du Poinçon, *Bruxelles.*

Francio.

K-do *Eugène Tabaste,* 161, rue Paul Bert, *Lyon, III.,* (maŝindentisto) dez. koni labormetodojn de aliaj landoj.

Germanio.

— Lab. Esp. Grupo Bremen, dez. koresp. pri ĉ. lab. temoj k. ĉ. l. Adr.: K-do *Kurt Brumlop,* Gellertstr. 86, *Bremen.*

K-do *Gerhard Laneus,* Bahnhofstr. 56, *Trebbin, Kr. Teltov,* dez. interŝ. *nur* PM, marko kontraŭ marko.

Rumanio.

K-do *Remuso Vasilieviciu,* str. Reg. Maria 21, *Deva,* interŝ. nur PM.

Sovetio.

K-do *Vj. Svjatskij,* Ŝevĉenkovskaja, d. n-o 92, Kniĵni magazin (librejo), *Ĉerkasi,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri aranĝo de libra afero k. pri propag. de libro.

K-dino *Rodŝtejn, Manja,* Elenovska 12, 14, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-do *Paĥomov Boriso,* str. de Pjatakov, 78, 9., *Kiev,* interŝ. L, PI, gaz. ĵurn. Resp. garantiata.

— *Radio- kaj Esperanto-rondetoj,* ĉe junpionira klubo Ratmanski, Verĥnij Val 30, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

K-dino *Goldberg, R.,* junkomunistino, Boriĉev Tok, 9, 1, *Kiev,* dez. koresp. k. ĉ. l.

Jenaj Gek-doj en *Ivanovo-Voznesensk* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. L, PI, PK:

K-dino *Belakowa, E. Vas.,* Bolŝ. Dm. M.

K-dino *Kuznecov, Nad. M.,* Bolŝ. Dm. M.

K-do *Semenov, N. M.,* Bulatovo, 1-a Preobraĵenska s. d.

K-dino *Boblova, Lub. Nik.,* Rab. pos. kvartalo 5, d. 6, kv. 8.

K-do *Sorokin, Vl. M.,* Novo-Dmitrovska, 3-a Nabereĵna 19/10.

K-dino *Konstantinova, Anfiso Vas.,* 10 Augusto d. b. Dunjuŝkin.

K-do *Marija Valentinoviĉ,* B. Tatarskaja 31, *Minsk,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj Ĉiam resp.

K-do *A. Klimov,* Len. str. 25, *Mariinsk,* Tomsk. okr. Siberio, dez. koresp. per L, PI, k. ĉ. l. pri ĉ. temoj. Resp. garant. Same, por niaj ĵurnaloj mi bezonas leterojn pri lab. vivo k. virina movado.

— Grupo de junaj pioniroj dez. koresp. kolektive aŭ individue, L, PK; PI, interŝ. presaĵojn. Adr.: K-do *B. I. Ŝipilin,* Nezamoĵnaja, 2, k. 10, *Dnepropetrovsk.*

AGENTEJO DE SAT

por Ukrainio estas fondita!

Ge-SAT-anoj de Ukrainio!

Membrokotizojn, abonpagon, mendojn por eldonaĵoj de *SAT* sendu al: **V. Kolĉinski — Esperanto, Kremenĉug.** Aliĝilojn preferinde sendu senpere al SAT-administracio, la monon — al la Agentejo.

Sendu multnombre

al ni en alta nordlando L, PK, PI k. esp-aĵojn. Respondo garantiata.

KLUBO ESPERANTISTA DE TRELLEBORG.

Adr.: K-do **Algot Haag,** Nygatan, n-o 68, **Trelleborg** (Svedio).

Informado pri Revolucia Ĉinio

Esperanta Gazetservo estas starigita.

Ĉiuj interesiĝantoj pri la politikaj kaj sociaj aferoj en Ĉinio povas ricevi informojn, skribante al:

K-do Hujucz, B. O. Box, 1332, Shanghai (Ĉinio).

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)